tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

Novembro 2025 / n-ro **146**

- Mortis Esperanta kaj kroatlingva verkistino Zora Heide (1924-2025)
- La bengala traduko per Esperanto – kroata donaco al la ĉefministro Narendra Modi
- Reeĥoj de Universala Kongreso de Esperanto en Brno, Ĉeĥio
- Kanadaj, koreaj, ĉinaj, ĉiliaj esperantistoj feriis en Kroatio

ISN 2991-194X

Karaj legantoj

Riĉa somero estas malantaŭ ni. Post kiam kroata esperantisto **Josip Pleadin** malkovris al esperantistoj la ĉarman insulon **Prvić** kun la feriejo **Požega** en **Prvić Luka**, multaj esperantistoj petis reveni tien, ne por kongresi sed por ferii. Tiel okazis ankaŭ ĉi-jare la Esperant-etosa junia feriado kiu kolektis dudekon da feriantoj. Inter ili tie la aktoroj **Saša Pilipović** kaj **Georgo Handzlik** ekzercadis preparante sian novan programon prezentota poste en **Brno**, Ĉeĥ**io**, ĉe Universala Kongreso de Esperanto.

En **Zagrebo** enkonduke al la somero **Nevenka Imbert** finis sian Esperanto-Kurson en la hejmo por maljunuloj ĉe la placo **Penkala**. La kurso vivigis la vivon de pluraj kursanoj kaj de la instruistino.

La slava kongresurbo **Brno** ricevis ĉi-jare sian Esperanto-nomon **Burnon**. Pri la kongresa etoso tie raportas **Filip Ivančić**, por kiu la kongreso estis la unua Universala. Li ankoraŭ en januaro kiel reprezentanto de EEU partoprenis en reta diskutado pri „Eŭropa Esperanto-Unio – la komuna hejmo por la eŭropa esperantistaro: kialoj, celoj, strategio“, organizita de Itala Esperantista Federacio.

Filip Ivančić dum la UK en Brno.
Fotis: Guillermo Bes Salazar

Pluraj esperantistoj post la kongreso venis al **Zagrebo** kaj vizitis **Kroation**. Ekzemple, el la korea urbo **Pusan** alvenis la esperantistino nomata **Granda, OH Gisook**, kiu havis celon viziti sian kunstudentinon el la studoj de la pola **Poznan, Ana Alebić-Juretić**. Ni tre ĝojis ke la koreaj esperantistoj alportis al ni librojn de kroataj aŭtoroj, publikigitaj en **Koreio** en la korea traduko el Esperanto farita de **Ombro**. La librojn ni bezonas por la Kroata Ŝtata Arkivejo, kiu esprimis deziron konservi niajn dokumentojn. Esperantisto el Sarajevo **Fetah Zvirac** alportis al ni plurajn bosniajn librojn rilatantaj al **Kroatio**.

La 30an de majo 2025 Literarna hiša **Maribor** gastigis kroatajn gastojn, verkistojn **Božidar Brezinščak Bagola** kaj **Spomenka Štimec** por la programo „Sosedstvo in več“ („Najbareco kaj pli“) por la slovena, ne nur esperanta, publiko.

Ankaŭ ĉi-jare ne mankis en **Zagrebo Zdravka Metz** kaj **Normando Fleury** el **Kanado**. La botanikisto **Normando** ne fotis nur plantojn kaj birdojn sed ankaŭ la Arkivejon. Niaj membroj kune vizitis la Arkivejon la 8an de aprilo kaj kun la gvidantino trarigardis ĝin. Ni eksciis ke la plej malnova dokumento tie gardata estas de la 11a jarcento. La konstruaĵo ekfunckiis en 1913, konstruita kiel *gesammtkunstwerk* (la kompleta artaĵo) de la arkitekto **Rudolf Lubynski**.

Esploristo **Juraj Bubalo** gastis ĉe Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“ la 8an de aprilo kaj prezentis sian novan kroatlingvan libron „Od Pola do Malnara“.

En aŭgusto vizitis nin ĉinaj esperantistoj **Arko** kaj **Longarko** kun sia edzino. La artikolon de **Longarko** pri lia mallonga halto en **Kroatio**, ni publikigas ĉi-numere.

La sinjorino **Arko**, kiu estas estraranino de UEA, komprenis kiom gravas por ni la verkoj tradukitaj per Esperanto en la ĉinan. Ŝi trovis en ĉina brokantejo la verkon el 1934 kiun ni serĉis. Ĝia aŭtoro estas **Dinko Šimunović**. Arko aĉetis ĝin kaj portos al ni en 2026.

En septembro alvenis **Josè-Antonio Vergara** el Ĉilio kun la edzino **Gladys.** Ili veturis al **Đurđevac** kaj **Split,** haltis en **Dubrovnik kaj Plitvice** kaj konatiĝis kun la fascina montego **Durmitor** en **Montenegro.** Planite-farite!

Kaj kio speciale plaĉis al ni nia amiko **Josè-Antonio** aparte estis impresita per nia biblioteko, kaj tute specife li interesiĝis pri la plej malnovaj titoloj. Li bezonas ilin ĉar li esploras kaj instruas pri la historio de ideoj.

„Esperanto – jezik za sve“ estas la titolo de la kroatlingva informilo kreita de esperantistoj el **Split**, en grafika aranĝo de **Ivan Špoljarec**.

D-ro Velimir Piškorec, lekcianta ĉe Filozofia fakultato en **Zagrebo,** informis ke en la vintra semestro 2024/2025 en elektebla studkurso de Planlingvoj por studentoj en bakalaŭra studprogramo de germanaj studoj studis 22 studentoj kaj en somera semestro 7 studentoj.

Spomenka Štimec informis la membrojn pri la letero de la Kroata Ŝtata Arkivejo kiu ŝatus transpreni la arkivon de Kroata Esperanto-Ligo. Por la membroj de Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“ ŝi prezentis kelkajn raraĵojn el nia arkivo.

Esperanto-Societo Rijeka havis elektojn kaj la nova prezidanto estas **Emil Horvatin. Ana Alebić-Jurić** realigis bultenon por sia klubo. La societo eldonis siajn bultenojn en marto kaj junio kaj mendis por la membroj la nigrajn kroatajn Esperanto-ĉemizojn, kiujn kreis nia vicprezidantino **Mihaela Cik**.

Nia nova membro **Višnja Katalinić** prelegis en la kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) en **Beograd** de julio 2025 pri la libro de la aŭstra verkisto **Johann Clemens Setz** „La abeloj kaj la nevidebla“. Tie ĉeestis 150 kongresanoj de la 19a ĝis la 26a de julio 2025.

Ana Alebić-Juretić aperis en la japana eldonaĵo Horizonto sub la titolo Esperanto por mi. En la verko estas portretitaj 16 esperantistoj de la mondo per biografioj kaj portetoj desegnitaj de **Helga Ploetner**.

tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Ĝis la jaro 2017 aperis papere kaj voĉe sur kompaktdiskoj.
Jaro XLVI (46), numero 146 (2/2025) ISN 2991-194X. Sona numero 64/2025.
Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj en Zagrebo ekde 2004 kaj en 2022, 2023 kaj 2024 ĉe la Biblioteko por blindaj kaj malbonvidantaj personoj en Zagreb. Voĉlegas Spomenka Štimec.
La reta versio de Tempo ĉe: www.esperanto.hr/tempo_kel.htm
Tempo estas eldonita per la financa kontribuo de Ministerio pri kulturo kaj amaskomunikiloj.
Redakcio / Uredništvo; **Eldonisto / Nakladnik:** Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; kel@esperanto.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935
Kontribuis: Ana Alebić-Juretić, Veronica Alzate, Arko, Božena Begović, Gladys Caro, Nataša Dorosulić, Josip Granđa, Zlatko Hinšt, Emil Hrvatin, Nevenka Imbert, Filip Ivančić, Ankica Jagnjić, Višnja Katalinić, Longarko, Eric Nsambiyumva, Zdenka Polašek, Guillermo Bes Salazar, Višnja Stahuljak, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Dubravko Toplak, Jose Antonio Vergara, Yan Cao
Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.
La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.
Sur la titolpaĝo: Zora Heide. Foto el la familia arkivo de Dubravko Toplak.

Hans-Werner Grossmann, svisa esperantisto kiu akompanis **Tibor Sekelj** tra **Afriko** en „Karavano de amikeco“ mortis en **Svislando** en aprilo 2025 kaj **Mirejo Grosjean** informis al la amikoj de Tibor Sekelj pri la forpaso.

La 27an de septembro kadre de **Esperanto-Tagoj** en **Rijeka** estis starigita la memortabulo sur la tombo de **Vjekoslav Morankić** en **Crikvenica**. Ĉeestis el **Zagrebo Ankica Jagnjić** kaj **Neven Kovačić**. Dum la Tagoj de Esperanto okazis renkontiĝo de esperantistoj el **Rijeka** kun la esperantistoj el **Trieste** en **Dolina Glibščice**.

En **Kragujevac** en **Serbio** estas preparata dulingva monografio pri la esperantlingva kaj serba aktoro **Saša Pilipović**, kies kariero startis en **Zagrebo**. **Spomenka** Štimec kontribuis per sia opinio pri aktorado de **Saša**.

Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo estas la tradicia aranĝo de bjelovaraj esperantistoj. Ĉi-jare ĝi estis dediĉita al instruistino **Antonija Jozičić**. La programo okazis en Česki obec la 29an de septembro. Muzikis Tamburica orkestro HORKUD **Golub**.

Du gejunuloj el **Kolumbio** vizitis nian klubejon en Vodnikova 9, **Veronica** kaj **Esteban Alzate**. Ili havis fortan kialon: ilia prapra-avo estis **Stanislav Tomić**, gravulo de la iama zagreba Esperantujo ĉirkaŭ la jaro 1919. Li publikigis lernolibron “Esperanto u 33 lekcije“ en 1919. Lia filo **Anton Tomić** lernis Esperanton en **Zagrebo** kaj gvidis la unuajn Esperanto-kursojn en la urbo **Medellin** en **Kolumbio** kien la familio **Tomić** elmigris**. Anton Tomić Mach** kunfondis **Kolumbian Esperanto-Asocio.** Nun la pranepoj komencas konstrui sian vivon en **Kroatio. Veronica,** profesie dazajnistino, komencis lerni Esperanton. Ankaŭ la nepino de **Anton Tomić Mach, Lorenza Saldariagga Tomić,** vizitis nin.

En septembro venis la morto: ni perdis **Marija Babić** kaj **Teodor Mikić**, aktivaj membroj de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio. Nome de ni ĉiuj de ili adiaŭis **Zlatko Hinšt**.

Ni petis librojn per la Biblioteka Apogo **Bachrich** el **Venezuelo** kaj atendas rezultojn de la konkurso.

En oktobro, kelkajn semajnoj antaŭ sia 101a naskiĝtago forlasis nin esperantlingva verkistino **Zora Heide**, mortinta la 10an de oktobro 2025. Ŝi estis okaze de siaj cent jaroj la stelo de nia Zamnehoftaga festo en 2025, okaze de sia centa vivjubileo.

Kiel ni festos la ĉi-jaran Zamenhoftagon en 2025 ni ankoraŭ ne decidis.

Spomenka Štimec

Partopreno de kroataj esperantistoj en Universala Kongreso de Esperanto en Brno

En la Universala Kogreso de Esperanto partoprenis deko da kroataj esperanatistoj el Kroata Esperanto-Ligo. Grupe veturis Josip Pleadin, Grozdana Grubišić Popović, Nataša Dorosulić, Siniša Dvornik. Partoprneis krome Ana Alebić-Juretić kaj Neven Kovačić. Ni veturis trajne tra Graz. Nia dua hejmo kiun ni torvis en Brno estis Studenta hejmo Mendelu. Mendelova Univerzita Brno estis la kongresejo. La unua prelego kiun mi spertis estis tiu de eminenta slovaka esperantisto Petr Balaž dediĉita al unuafojaj kongresanoj, kio mi ja estis. Impresis min la malfermo kun la paroladoj de la prezidanto Duncan Charters kaj la direktoro Martin Schaffer. La muzikan programon prepares Kajto.

Mi partoprenis en la prelego pri historio de Esperanto-Movado en Ĉeĥio kaj pri la historio kaj la naturo de Ĉehio, prelegojn pri Petr Ginz kaj la historio de la japana kultura kaj religia movado Oomoto. Dum la ekskursa tago mi iris al la urbeto Kromerž kun dudek aliaj kongresanoj.

La kongreso por mi estis aparta travivaĵo. Mi renkontis malnovajn amikojn kaj gajnis novajn. Mi sentis specifan fratecon, unuecon kaj simpation inter ĉiuj. Mi esperas partopreni venontjare en Graz. Min feliĉigas la fakto, ke mi povas esti parto de unu granda familia rondo, kiu strebas krei el la mondo pli bonan lokon por vivi por ni ĉiuj.

Filip Ivančić

Fernando Maia Jr. - la nova prezidanto de UEA elektita en Brno.

ĈINAJ ESPERANTISTOJ DUM SOMERA VIZITO AL ZAGREBO

Post la Universala Kongreso de Esperanto en **Brno** en **Ĉeĥio**, tri ĉinaj esperantistoj vizitis Zagrebon ekde la 3a ĝis la 9a de aŭgusto. Inter ili estas sinjorino **Arko**, (**XFGong**) estrarano de Universala Esperanto-Asocio kaj ege aktiva ĉina Movadano. En la delegacio estis ankaŭ s-ro **Longarko**, tre aktiva ĉina esperantisto kiun akompanis lia edzino **Cau Yan**. Li sendis al ni siajn opiniojn pri **Zagrebo**.

Neven Kovačić montris al ili **Zagrebon**. Ĉar nuntempe en **Ĉinio** estas tradukata verko de **Spomenka Štimec** "Hodler en Mostar" ĉinoj kun intereso aŭskultis aldonajn informojn pri la verko kaj vizitis la preĝejon Sanktan Markon, nuntempe elegante renovigita post la tertremo por konatiĝi kun la freskoj de la konata kroata pentristo **Jozo Kljaković**, iam studento ĉe la pentristo **Ferdinand Hodler**. La instruisto **Ferdinand Hodler** inspiris al la lernanto kreadon de la pejzaĝo, ekz. sur la fresko pri **Sankta Lazaro**. La ĉinoj konatiĝis ankaŭ kun la nepino de la pentristo **Teodora Kljaković-Bakota** kiu akompanis ilin tra la preĝejo (cetere malfacile

Ĉe la freskoj de Jozo Kljaković en la preĝejo de Santa Marko. Fotis Arko

alirebla post la atentatprovo al la Parlamento, post kiu la promenado tra la Placo de Santa Marko ne plu estas permesata.) La gastoj devis rezigni pri vizito al **Đurđevac** pro malsaniĝo de la gastiganto **Josip Pleadin**. Ili ankaŭ ne efektivigis viziton al **Hrvatska Kostajnica** por konatiĝi kun la verko de **Antonija Jozičić** pro trafika izoliĝo de la loko, dum ilia dense programita vojaĝo.

Ili konatiĝis kun la laboro de Kroata Esperanto-Ligo.

La gastoj vizitis **Rijeka**, ili gastis ĉe **Ana Alebić-Juretić** kiu kun sinjorino **Arko** amikas post la komunaj studoj en la Universitato en **Poznan**, **Pollando**.

S.Š.

VIZITO DE ĈINAJ ESPERANTISTOJ AL RIJEKA

Vizto al kastelo Trsato. Fotis Yan Cao

Post la 110-a UK en Brno, du ĉinaj esperantistoj decidis viziti Kroation. La vizitantoj estis Dr. Xiaofeng Gong (esperanta nomo Arko), emerita universitata profesoro el Nanchang kaj estrarano de UEA, kaj Changsheng Zhang (Longarko) kun sia edzino. Dr. Xiaofeng Gong havis gravan rolon en Ĉina Esperanto-movado, li estis prezidanto de la provinca Esperanto-asocio (Jiangxi), estro de la Ĉina ILEI sekcio, estrarano de ILEI kaj Akademiano. Ŝi finis lastjare la postdiploman studon de Interlingvistiko kaj Changsheng Zhang unujara instruista trejnado ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. Krom Zagrebon ili vizitis ankaŭ Rijeka, ekde la 7a ĝis la 11a de aŭgusto 2025. Krom interŝanĝo de opinioj pri la nuna situacio en Esperanto kaj esperanto movado (ĝenerale malkresko de intereso por lerni Esperanton), ni vizitis la kastelon Trsat en Rijeka kaj urbetojn en ĝia ĉirkaŭaĵo: Mošćenice, Mošćenička Draga kaj Opatija. Kun Arko ni vizitis ankaŭ Pula, urbon proksimume 100 km de Rijeka, kun multaj restaĵoj de la romia epoko (Areno, Templo de Aŭgusto, Ora Pordo). Niaj ĉinaj esperantistoj ĝuis marbaniĝi sur la plaĝoj, sperto kiun oni ne havas hejme.

Ana Alebić-Juretić

Arko fronte al Areno en Pula. Fotis A. Alebić-Juretić

EN ZAGREBO, KROATIO

La malfrua somero en Brno portas freŝan aeron kaj oran koloron. Post okhora vojaĝo per turisma buso el Brno, Ĉeĥio, ni fine alvenis en Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio. La longa vojo postlasis iom da laciĝo, sed antaŭ la vizito al la oficejo de Kroata Esperanto-Ligo, la antaŭatendo kaj ekscitiĝo forigis la lacajn sentojn.

La folioj en Zagrebo jam iom post iom flaviĝis, kaj la malpeza vento flirtigis ilin sur la vojo. Elirinte el la busstacio, ni prenis taksion kaj direktiĝis al la oficejo de Kroata Esperanto-Ligo laŭ la konata adreso. La veturado tra la stratoj de Zagrebo montris urbon kun mikso de historia kaj moderna – malnovaj arkitekturaj konstruaĵoj interplektiĝis kun viglaj kafejoj kaj butikoj. La ŝoforo afable konfirmis la celon, kaj post proksimume dek minutoj, ni alvenis.

Tuj post nia alveno ni malkovris, ke la oficejo estis fermita. Pro manko de laboristoj, ni decidis unue trovi loĝlokon. Apud la oficejo, ni trovis Ĝardenan Hotelon, kiu aspektis trankvila kaj agrabla. La ĝardeno malantaŭ la hotelo estis prizorgata, kun diversaj floroj kaj verda herbo, kiu donis refreŝigan senton. Ni eniris la hotelon kaj enregistriĝis. La akceptisto estis afabla, kaj la ĉambro estis pura kaj komforta, kun fenestro direktita al la ĝardeno. Ordinte niajn bagaĝojn, ni ripozis iomete kaj refreŝiĝis per trinkado de teo.

Arko, Spomenka kaj Longarko antaŭ la konstruaĵo en Vodnikova 9. Fotis Yan Cao

Je la kvina posttagmeze, ni denove iris al la oficejo de Kroata Esperanto-Ligo. Ĉi-foje la pordo estis malfermita. En la oficejo akceptis nin eleganta sinjorino, kiu ŝajnis ĵus alveninta. Ŝi surportis veston kaj ĉapelon, kiuj ne estis luksaj, sed donis imponan kaj gracian impreson. La vesto estis simpla sed eleganta, kaj la ĉapelo harmonie kompletigis ŝian tutan aspekton. Ŝiaj manieroj estis naturaj kaj ĝentilaj, kaj ŝia rideto donis varman kaj bonvenan senton.

Kiam ni eniris, ŝi tuj parolis al ni en flua Esperanto. La sono de Esperanto elfluis en la tutan ĉambron, kiel dolĉan muzikon. Ŝi sin prezentis kiel Spomenka Ŝtimec, la ĝenerala sekretario de Kroata Esperanto-Ligo. Ŝia parolo estis klara kaj vigla, kaj ŝiaj vortoj plenis je entuziasmo kaj amo por Esperanto. Ŝi afable demandis pri niaj vojaĝoj kaj spertoj, kaj montris grandan intereson pri nia vizito. En la interparolado, ŝi menciis la historion kaj aktivaĵojn de Kroata Esperanto-Ligo, kaj esprimis sian deziron antaŭenpuŝi la disvastigon de Esperanto.

La oficejo estis plenplena sed iom malorda, kun libroj kaj materialoj pri Esperanto sur la bretoj. Sur la muroj pendis fotoj de diversaj Esperanto-renkontiĝoj kaj aktivuloj, registrante gravajn momentojn en la kroata Esperanto-movado. Spomenka Ŝtimec montris al ni ĉi tiujn fotojn kaj klarigis la historiojn malantaŭ ili, per kiu ni profunde perceptis ŝian sindonon kaj kontribuon al Esperanto.

Poste, ŝi proponis montri al ni la ĉirkaŭaĵon. Ni promenis tra la stratoj de Zagrebo kaj ĝuis la ĉarmon de ĉi tiu urbo. Spomenka Ŝtimec ne nur enkondukis la historiajn kaj kulturajn fonojn de la urbo, sed ankaŭ menciis la aktualecon de la Esperanto-movado en Zagrebo. Ŝia scipovo kaj pasio impresis nin, kaj ni sentis ŝian aŭtentan varmecon kaj gastamon.

Promeninte, ŝi proponis regali nin en lokstila restoracio. Dum la manĝado, ni plue interŝanĝis opiniojn pri Esperanto kaj la internacia kulturo. Spomenka Ŝtimec emfazis la gravecon de Esperanto por internacia komunikado kaj kulturo-interŝanĝo, kaj kredis ke per komuna klopodo, Esperanto povas pli bone servi al la mondo. Ŝiaj vortoj estis profundaj kaj inspiraj, lasante al ni multe por pripensi. Mi ankaŭ faris simplan intervjuon kun ŝi pri kiam ŝi esperantistiĝis, kiel ŝi lernis nian lingvon, ktp. La intervjuo estis registrita de mia poŝtelefono.

Ni ĝuis turisman aspekton de **Zagrebo** dank al la lerta turisma gvidanto **Neven-Alan** kaj vizitis **La Lagojn de Plitvice**, la monton **Sljeme**, sed ankaŭ vizitis la najbaran landon **Slovenion** kaj ĝian ĉefurbon **Ljubljanan**.

Antaŭ la adiaŭo, Spomenka Ŝtimec donis al ni iujn Esperanto-librojn kaj informfoliojn kiel memoraĵojn, kaj esprimis siajn bondezirojn por nia posta vojaĝo. Ni dankis ŝian varman akcepton kaj signifoplenan interŝanĝon.

Forirante el Zagrebo, ni sentis plenan kaj feliĉan koron. La tuta renkontiĝo ne nur profundigis nian komprenon pri la kroata Esperanto-movado, sed ankaŭ donis al ni neforgeseblan renkontiĝon.

Longarko

Ĉinaj gastoj en Vodnikova 9. Fotis Yan Cao

HINDUNIA ĈEFMINISTRO NARENDRA MODI EN KROATIO

La 18an de junio la ĉefministro de Hinda Unio **Narendra Modi** alvenis al la oficiala vizito en **Kroatio**.

Multaj gastlaboristoj el **Hinda Unio** kiuj laboras en Kroatio salutis lin surstrate dum la urbotrarigardado. En **Kroatio** laboras ĉ. 4000 laboristoj el **Hinda Unio**.

La ĉefpartnero de la hindunia gasto en **Kroatio** estis la kroata ĉefministro **Andrej Plenković**. Dum la oficiala vizito plurajn kontraktojn pri la kunlaboro estis subskribitaj.

Estas interese ke Kroat-Hindunia Societo antaŭ la alveno de la altprestiĝa gasto invitis **Spomenka Štimec** prelegi pri la peresperanta kunlaboro kun **Hinda Unio**. La prelego okazis en Asocio de universitataj lekciistoj la 28an de aprilo 2025. Okaze de la prelego **Spomenka Štimec** donacis ekzempleron de la bengala traduko de "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić" de **Ivana Brlić Mažuranić** al la biblioteko de la Asocio. La prezidanto de la societo **Joginder Singh-Nijjar** kaj la sekretario **Darko Žubrinić** profitis de la libro, provizis ĝin per la (anglalingva dediĉo) kaj donacis al la ĉefministro kiel unu de la donacoj de la societo!

La tradukisto **Probal Daŝgupta** miris pri la rezultoj de la traduko.

S. Štimec

Spomenka Štimec okaze de laprelego. Fotis Nataša Dorosulić

"Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić" en la bengala.

LAVOSLAV KRAUS – esperantisto kiu eniras modernan kroatan literaturon

Nenad Rizvanović (1968) estas kroata verkisto. Lia nova romano havas por la heroo esperantiston **Lavoslav Kraus** (1897 -1984), kuraciston kaj komuniston kiu vivis en **Osijek** kaj **Beograd** kaj faris gravajn servojn al la jugoslavia Esperanto-movado. Nun **Kraus** rolas en la nova romano de **Rizvanović** kiel novsoldato.

Laŭ informo de la grava kroata esperantisto **Ivo Borovečki, Lavoslav Kraus** posedis en sia biblioteko la plej grandan kolekton de la libroj **"Komunisma manifesto"** en multaj lingvoj**.** Prezidanto de la Esperanto-Societo "Liberiga Stelo" en **Osijek** kaj de Jugoslavia Esperanto-Ligo, li aŭtoris la verkon "Susreti i sudbine", kiu aperis en Osijek en 1897. La aŭtoro parte uzis la veran biografion de **Kraus**, parte fikcie prezentis lian vivon. La verko de **Rizvanović** baldaŭ aperos en **Zagrebo.**

En la kroata Esperanto-movado **Kraus** aparte gravis kiel kunaŭtoro (kun **Dragutin Wranka**) de la esperanta vortaro **"4000 vortoj"** kiu havis 8 eldonojn ĝis 1980 kaj poste aperis plivastigita kiel "10.000 vortoj" (esperanto-kroatserba kaj kroatserba-esperanta vortaro), en la 9a eldono en 1989 de aŭtoroj **Gruić**, **Kocian**, **Pleadin**, **Šimunić**.

S. Štimec



LOKAJ BALOTOJ EN KROATIO: Analizo de paradoksoj

(Artikolo de Filip Ivančić el la revuo MONATO (www.monato.be)

La jaro 2025 estas tre aktiva koncerne la internan politikon de Kroatio. Komence de la jaro la civitanoj de la plej nova membroŝtato de Eŭropa Unio* reelektis novan-malnovan prezidanton Zoran Milanović. La iama ĉefministro kaj prezidanto de la maldekstra Social-Demokrata Partio venkis glate en la dua elektofazo sian rivalon Dragan Primorac – la kandidaton de la dekstra partio Kroata Demokrata Unuiĝo. La politikan printempon de 2025 tamen markis lokaj balotoj. La unua fazo de ili okazis la 18an de majo. En ĉi tiu artikolo ni koncentriĝos pri la rezulto de lokaj balotoj en la ĉefurbo Zagrebo kaj provos analizi kelkajn strangaĵojn, rilatajn al ili.

La zagreba afero

La kroata ĉefurbo Zagrebo kaj sep kandidatoj por ĝia urbestreco estis en la fokuso de amaskomunikiloj dum la balotkampanjo multe pli ol la kandidatoj en tri aliaj plej grandaj urboj de la lando. La tiama urbestro Tomislav Tomašević batalis kontraŭ ses aliaj kandidatoj de diversaj politikaj profiloj. Li mem venas de verda-maldekstra politika spektro. Li estis ĉefiniciatinto kaj gvidanto de la opozicia platformo *Zagreb je naš!* (Zagrebo estas nia!). Poste el la platformo ekestis pli granda politika asocio *Možemo!* (Ni povas!), kiu rapide akiris popularecon kaj fariĝis parlamenta partio kun dek seĝoj. Eĉ antaŭ la elektoj la enketoj kaj analizistoj favoris la tiaman urbestron kaj prognozis certan venkon por li jam en la unua elektorondo. Kaj vere, post la unua elektorondo,

"Nehalteble por Zagrebo" - la balotslogano de la politika asocio "Možemo!". Ilustraĵo: https://mozemo.hr/nezaustavljivo-za-zagreb/

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

okazigita la 18an de majo, Tomašević gajnis kun 47,59 % de la voĉoj. Lia konkurantino en la dua elektofazo estis Marija Selak Raspudić, sendependa konservativa deputitino en la parlamento de Kroatio kaj universitata profesorino.

Indiferenteco pri balotoj

Tio, kio markis la ĉi-jarajn lokajn balotojn en Kroatio, estas la malalta nivelo de partoprenado de voĉdonrajtuloj. Malalta politika kulturo kaj ia indiferenteco de la loĝantoj pri la balotoj ne estas novaĵo en Kroatio. En Zagrebo voĉdonis ĉirkaŭ triono de la loĝantoj en la dua elektofazo. La pasintan mandaton de Tomašević markis evidenta neefikeco kaj malkapableco de li kaj liaj kunlaborantoj en solvado de ĉefaj problemoj kiuj turmentas Zagrebon kaj ĝiajn civitanojn. Tio unuavice estas konstantaj trafikŝtopiĝoj tra la tuta urbo kaj amaso da rubaĵo en stratoj kaj publikaj spacoj. Kvankam la urbestro mem kaj la urba konsilantaro pri trafikŝtopiĝoj kulpigas tro altan kvanton da aŭtomobiloj en la urbo, estas nekontestebla fakto, ke ili malsukcesis realigi siajn planojn kaj projektojn por plibonigo de la trafika situacio en la ĉefurbo. Ankaŭ la problemo de rubaĵmastrumado restis. Malgraŭ ĉio tio, civitanoj de Zagrebo denove donis sian fidon al Tomašević, kiu en la dua elektofazo gajnis kun 57 % de la voĉoj kaj lasis sian konkurantinon malantaŭ si. Ĉu li en la nova mandato pravigos la konfidon de siaj elektantoj, tio estas malfacile antaŭvidebla. La civitanoj estas evidente tiom malkontentaj kaj indiferentaj kontraŭ la nuna politika situacio en la lando, ke ili ne povas kompreni la gravecon de baza demokratia rajto, kiu apartenas al ili.

Filip Ivančić

– – – – – –

* La 1an de julio 2013 Kroatio oficiale fariĝis la 28a membroŝtato de Eŭropa Unio. En 2023 lando aliĝis al la Eŭro-zono kaj al la Ŝengena areo.

***Filip IVANČIĆ** studis germanan kaj slavan filologion en la universitato de Zagrebo kaj laboras kiel teknika tradukisto.*

Pranepoj el Kolumbio revenas al Kroatio, la lando de la praavo-esperantisto

Dum oktobro 2025 ni havis interesajn vizitantojn el **Kolumbio** el la urbo **Medellin**, La junaj gefratoj **Veronica** kaj **Esteban Alzate** vizitis nin ĉar ilia prapra-avo **Stanislav Tomić** estis grava zagreba esperantisto, samkiel ilia praavo **Anton Tomić Mach**, kunfondinto de Kolumbia Esperanto-Ligo. Stanislav naskiĝis en **Lič** en **Kroatio** en 1879, tiam **Aŭstro-Hungario** kaj mortis en **Kolumbio** en 1930. Lia filo **Anton** lernis Esperanton en 1919 per la lernolibro de sia patro. Alveninte al la urbo **Medellin** ili okupiĝis pri sia inĝeniera profesio kiel konstruistoj de vojoj kaj fervojoj. Ankaŭ la edzino de **Anton** estis eŭropdevena. Ŝian familian nomon **Anton** aldonis al la sia. Ilia filino **Viktoria** ne parolis Esperanton.



Lernolibro kompilita de Stanislav Tomić, eldonita en la jaro 1919,

La gejunuloj okupiĝas profesie pri dezajno. Ili akiris kroatan ŝtatanecon kaj eklaboris en **Kroatio**. **Veronica** ankaŭ komencis lerni Esperanton en **Zagrebo**, honore al sia praavo. Ilia onklino **Lorenza Saldarriaga Tomić** venis al la mallonga vizito de genevoj en **Zagrebo** kaj vizitis la esperantistajn posteulojn de siaj antaŭuloj.

S. Š.

Esteban, Spomenka kaj Veronica. Fotis: Veronica Alzate

Biblioteka apogo Bachrich por helpi al esperantaj bibliotekoj

Johano kaj **Maria Bachrich** estis konataj esperantistoj el **Venezuelo**. Post ilia morto iliaj gefiloj starigis malavaran donacon de 10.000 eŭroj el kiuj eblas helpi al Esperanto-Bibliotekoj memore al la gepatroj. Niaj bibliotekoj jam antaŭe havis similan apogon de la fondaĵo kreita de danaj geedzoj **Thorsen**, la poeto **Poul** kaj lia edzino **Roma**. Pri la fondaĵoj **Thorsen** ĝis ties elĉerpiĝo kaj **Bachrich** mastrumas Universala Esperanto-Asocio.

Johano Bachrich naskiĝis en Vieno en 1921. Esperanton li lernis en **Zemun**, tiam en **Jugoslavio** en 1938. Aktivis pri Esperanto en **Venezeulo** ekde sia alveno tien en 1948.

En la jaro 2025 Kroata Esperanto-Ligo kandidatis por la apogo Bachrich, celante havigi kelkajn verkojn de kroataj verkistoj en Esperanto. Duoblaĵoj de la kroataj verkistoj ni ŝatus transdoni al la Kroata Ŝtata Arkivejo.

S. Š.

Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo

Dum 13 jaroj sinsekve esperantistoj de **Bjelovar** septembre okazigas programon „Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo“. En la fokuso de la programo en 2025 estis instruistino el **Kostajnica Antonija Jozičić** kaj ŝia traduko de *Konfeso* de **Milka Pogačić**. Pri **Antonija Jozičić** prelegis **Josip Pleadin** kaj partoprenis **Zdravko Seleš** kaj **Nataša Dorosulić**. Konata bjelovara muzika ensemblo HORKUD Golub grave kontribuis al la sukceso de la programo per la muziko el la epoko de **Antonija Jozičić**.

Ĉi-jare la programo okazis la 27an de Septembro en la ejoj de Češka obec. La programo omaĝis ankaŭ al la tago de instruistoj.

Z.P.

Eric Nsabiyumva prezentis Esperanton

Okaze de la 20a de junio, Internacia tago de migrantoj, la kroata portalo “Putni kofer” intervjuis afrikan esperantiston **Eric Nsabiyumva** kiu dum la lastaj jaroj vivas en **Zagrebo**. **Eric** rakontis pri sia vivo de azilpetanto kaj pri la spertoj en **Kroatio**. Aparte li informis pri la signifo de Esperanto en sia kroata vivo: Esperanto grave helpis lin integriĝi en la kroatan socion.

Eric partoprenas en la programo “Afrika rakonto” prezentante al gejunuloj en bibliotekoj diversajn informojn el **Afriko** kaj precipe el sia lando **Burundo**.

Li ankaŭ partoprenis en la biblioteka programo “Librojn sur la montojn”.

A. Jagnjić

José Antonio Vergara en Zagrebo

José-Antonio Vergara, kuracisto-epidemiologo kaj esperantisto el Ĉilio vizitis **Zagrebon kaj Đurđevac** kun sia edzino **Gladys Caro** en septembro 2025 kadre de la ampleksa vizito al **Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino** kaj **Montenegro**. Ne sukcesis la planita renkontiĝo kun la esperantistoj en **Split.** Post konatiĝo kun la monto **Durmitor** en **Montenegro** la paro revenis al **Zagrebo.** La urbon kaj ĝian historion montris al ili **Neven Kovačić**.

La 22an de septembro **José-Antonio** en la zagreba Esperanto-Societo "Tibor Sekelj" renkontiĝis kun dek du zagrebaj esperantistoj. Estis interesa amikumado post kiu la gasto malkovris valorojn de nia biblioteko. Li aparte ŝatis la plej malnovajn librojn pri la fenomeno de la Internacia Lingvo. Por liaj estontaj prelegoj en la hejmlando ni skanis por li kelkajn petitajn titolojn.

S. Š.

Gladys, Spomenka kaj José-Antonio.

PREMIO "Tibor Sekelj"

La 58a Pupteatra Internacia Festivalo - PIF, kiun en 1967 lanĉis Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo, okazis ĉi-jare inter la 12a kaj la 18a de septembro en la organizo de Kultura Centro Travno (antaŭe Internacia Kultura Servo). En la konkura programo partoprenis 16 teatroj el Bosnio kaj Hercegovino, Ĉeĥio, Ĉilio, Estonio, Hispanio, Italio, Kanado, Kroatio, Pollando, Slovakio, Slovenio kaj Serbio.

La premion "Tibor Sekelj", por la teatraĵo kun la plej homama mesaĝo, la unuan fojon ne ricevis teatro, sed la persono - **Livija Kroflin**, multjara redaktorino de la oficiala festivala programa, por la ĉi-jara elekto de prezentaĵoj, kiuj senescepte ĉiuj estis profunde homamaj, pacamaj kaj kompatemaj, tiel ke ĉiu el ili miritus ricevi tiun ĉi unikan teatran premion.

I. Š.

Livija Kroflin (dekstre) kaj la direktorino de Kultura Centro Travno Gorana Sojat, dum la enmanigo de la premio. Fotis Ivan Spoljarec

Tagoj de Esperanto en Rijeka

La ĉi-jaraj *Tagoj de Esperanto* en **Rijeka** estis dediĉitaj al la starigo de la memortabulo sur la tombo de **Vjekoslav Morankić** en la tombejo de **Crikvenica**. La memortabulo estis starigita sabaton la 27-an de septembro en la ĉeesto de pluraj membroj de Esperanto-Societo Rijeka, inkluzive de la filo de **Vjekoslav Morankić, Damir**. Flanke de **Zagrebo** en la ceremonio partoprenis **Ankica Jagnjić** kaj **Neven Kovačić**.

Antaŭ la starigo de la tabulo esperantistoj amikumis en la Hostelo Esperanto en **Kostrena**, kiun por Esperanto-Societo Rijeka akiris **Vjekoslav Morankić**. Esperanto-Societo Rijeka daŭre ludonas la Hostelon al la Asocio de skoltoj de la urbo **Rijeka**.

La duan tagon de la programo la esperantistoj de **Rijeka** renkontiĝis kun Triesta Esperanto-Asocio en la Domo de montgrimpantoj **Premuda** en la **Valo Glinščice**.

Esperanto-Societo en **Rijeka** en 2025 agas sub la gvido de nova prezidanto **Emil Hrvatin**.

Tihomir Lovrić gvidis tie kurson por komencantoj ekde februaro 2025. **Ana Alebić-Juretić** preparis en 2025 du societajn bultenojn nomataj Informiloj.

Emil Hrvatin

S. Š.

Kroataj esperantistoj ĉe ILEI-kongreso en Beograd

Du kroataj esperantistinoj **Višnja Katalinić** kaj **Marija Jerković** prelegis ĉe kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazinta en **Beograd** de la 19a ĝis la 26a de julio 2025: **Višnja Katalinić** prelegis persone kaj **Marija Jerković** per Zoom-programo. **Neven Kovačić** lingve helpis al la aranĝo.

La gastiganto de la kongreso estis Serbia Esperanto-Ligo, kiun prezidis **Jovan Zarković**. Ambaŭ prelegantinoj ricevis atestilon pri la laboro en **Beograd**. La temo de **Višnja Katalinić** estis la aŭstra verkisto **Clemens Johann Setz** kaj lia ampleksa verko pri la planlingvoj, titolita "La abeloj kaj la nevideblo". Ŝi enfokusigis la kroatajn paĝojn de la verko. Jen ŝia ILEI-atestilo.

La venonta ILEI-kongreso okazos en Ĉinio en 2026.

S. Š.

Višnja Stahuljak

LA MATENA GUTO

En via fundo
moviĝas io
rompita
nutuŝebla
viafonde
elfluas io
sin mem regeneranta
dum favorradio brilas
en guto matena
io el via fundo
leviĝas foje
al la spiro-surfaco
elradiante malaperon
persiste daŭranta

Tradukis Zora Heide

La poemo estas transprenita el la libro "Krepuskoj" (eldono de IKS, 2001). Foto: Ivan Špoljarec

ZORA HEIDE (1924-2025)

La verkistino **Zora Heide** kiu apartenis al la Esperanta kaj kroata literaturoj sed membris siatempe ankaŭ en la literaturaj asocioj de **Danlando** kaj **Svedio**, mortis en sia ŝatata Zagrebo la 11an de oktobro 2025, kelkajn semajnojn antaŭ sia 101-a naskiĝtago. Ŝi estis naskita en la familio de la vilaĝa instruisto-esperantisto **Mijo Vinceljak** kiel **Katica Zorka Vinceljak** en **Levinovac** apud **Virovitica** la 23an de novembro 1924. Kiel knabino ŝi lernis Esperanton de la patro. Ŝi alprenis sian nomon **Heide** post la geedziĝo kun la dana esperantisto **Karl Johann Heide**, kiam ŝi translokiĝis al **Kopenhago** en 1960. Per tio finiĝis ŝia agado en la kroataj fervojistaj esperantistaj rondoj kie ŝi aktivis kiel gazetredaktoro ekde 1959.

Eniris la esperantan literaturon per poemo en *Norda Prismo* en 1964. Post tio ŝi regule partoprenis en literaturaj konkursoj kaj ofte estis premiita, plufoje ĉe Floraj Ludoj. Profesie ŝi estis medicina teknikistino.

Multe ŝi tradukis al/el diversaj lingvoj, estis reprezentitaj en pluraj antologioj, inkluzive *La Trezoro* ĉe HEA en Budapest 1989. Aparte ŝi ŝatis traduki versojn de sia samklasanino, grava kroata poetino **Višnja Stahuljak**, kolektitaj en la verko *Krepuskoj***.**

Sindona kaj fidela esperantisto, ŝi finance subtenis multajn agadojn de esperantistoj ĉu el **Danlando**, el **Svedio** aŭ **Islando**, kie ŝi vivis, reveninte al sia naskiĝlando por pasigi tie la jarojn de la 21a jarcento. Ŝia grava libro estas traduko de la belega fantasta rakonto *Mor* de **Đuro Sudeta**, kiun ŝi tradukis por **Mato Sudeta**, la frato de la aŭtoro. La verko estis eldonita en **Bjelovar** de Bjelovara Esperantista Societo en 2022. La lasta publikigita traduko estas *La garbeno, la malbona vento* de **Anela Borčić**.

En niaj bibliotekoj restas ŝiaj originalaj libroj *Ni*, *homoj* el 1970, *Ni komedietas* en 1971, *Etulaj aventuroj*, 1983, *Male pustolovine* 1983, *Kantoj de l' silento* 1984, *Spuroj de l' doloro* 1984, *Nisam te zaboravila, grade* 1984, *Groteskaj dialogoj* 1985, samkiel ŝiaj gravaj tradukoj: *Krepuskoj* de ŝia amikino **Višnja Stahuljak**, *Mor* de **Đuro Sudeta** kaj *Garbeno, la malbona vento* de **A. Borčić**. La tradukoj de la kroataj poetoj aperis en multaj antologioj. Libroforme aperis ŝia traduko de *Noktogardisto* de **Šimun Šito Ćorić**, 2008.

La dudeka jarcento kaj ties Esperantujo bele reflektiĝas en la originalaj kaj tradukitaj verkoj de **Zora Heide.**

Spomenka Štimec

Zora Heide en sia laborĉambro en Kopenhago. (Foto el la familia arkivo de Dubravko Toplak.)

Zora Heide kun la edzo. (El la familia arkivo de Dubravko Toplak.)

MARIJA BABIĆ (1945 - 2025)

La 4-an de septembro 2025 mortis nia membrino kaj kolegino **Marija Babić** en **Zagrebo**. Ŝi estis enterigita en loka tombejo de ŝia naskiĝvilaĝo **Donja Vrba** apud urbo **Slavonski Brod**. Ŝi fariĝis membro de tiama Fervojista Esperanto-Societo Zagrebo en la jaro 1986, kie en la 1988 ŝi finis A-kurson. Marija laboris kiel oficistino de Kroata Poŝto en Zagrebo, en diversaj postenoj. En Kroata Fervojista Esperanto-Asocio ŝi estis unu el obstinaj kaj regulaj vizitantoj de KFEA-ejoj kaj programoj de esperantistoj. Ofte ŝi partoprenis naciajn kaj internaciajn kongresojn kaj membris en Kontrola komitato de nia fervojista societo.

Zlatko Hinšt

TEODOR MIKIĆ (1948-2025)

La 19-an de septembro 2025 mortis nia membro kaj kolego **Teodor Mikić**. Li vivis en urbeto **Dugo Selo** apud **Zagrebo**, en vilaĝo **Ostrna**, kaj laboris profesie en Zagrebo en sia laborejo kiel ŝuisto. Poste kiel pensiulo li havis pli da tempo. Li fariĝis membro de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio en la jaro 2012 kiel sperta esperantisto. Teodor estis bonhumora kaj bonvolema homo, li ŝatis multe legi, amikumadi kaj multe paroli. Li estis aktiva en Libervola Fajrobrigadista Societo **Dugo Selo**.

Zlatko Hinšt

Božena Begović *(1901-1966)*

MORTADO DE SOMERO

Mi aŭdas ĉiun nokton kiel somer' mortantas.
Ankoraŭ noktoj varmon tremlaŭtan portas
Kaj ankoraŭ kanton la cikado kantas –
Mi aŭdas ĉiun nokton: la somero dolĉe mortas.

Kaj aŭdas ĉiun nokton kiel fruktoj maturas.
Kaj kiel ilia falo sur herb' odora susuras –
Kaj kiel stelaj riveroj ĉiele murmuras.
Mi aŭdas ĉiun nokton kiel fruktoj maturas.

Mi aŭdas: ĉiun nokton mortas somer' folia
Kaj noktoj ankoraŭ varmon tremlaŭtan portas!
Kaj donas somero kison al miele pasia
Buŝo de la tero, kiu mortas.

Tradukis Josip Granđa (1879-1953)
Publikigita en "La Suda Stelo",
Slavonski Brod, Februaro 1940

Fotoj: Ivan Špoljarec - Štef